Deklaro de Universala Esperanto-Asocio Okaze de la Ĉi-jara Internacia Tago de la Indiĝenaj Popoloj de la Mondo: 9 Aŭgusto 2016

Artikolo 14 (1) de la Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj diras, ke “indiĝenaj popoloj havas la rajton fondi kaj regi siajn edukajn sistemojn kaj instituciojn, liverante edukadon en siaj propraj lingvoj, en maniero konvena al iliaj kulturaj metodoj de instruado kaj lernado.

La Universala Esperanto-Asocio, la ĉefa organizaĵo de parolantoj de la internacia lingvo Esperanto, subtenas la uzadon de la patrina lingvo en frua edukado. Ni kredas, ke la lingvo en kiu ni plenkreskas estas io konservinda kaj kreskiginda ĉar ĝi konsistigas parton de nia identeco. Ni kredas, ke ĉiu havas rajton uzi sian propran lingvon.

Dum aprilo de la nuna jaro, Simpozio pri Lingvo kaj la Celoj por Daŭripova Evoluigo, organizita sub nia aŭspicio, forte konfirmis la valoron de edukado per la patrina lingvo. Ni konsideras patinlingvan edukadon grava elemento en la atingo de CDE 4, de bonkvalita edukado.

La rajto de infanoj lerni sian patrinan lingvon kaj daŭrigi sian edukadon uzante sian patrinan lingvon estas ne nur grava por ilia kulturo: ĝi estas esenca por ilia psikologia evoluo. Kiam infanoj lernas legi kaj skribi en sia patrina lingvo, ili atingas alfabetecon pli rapide kaj kun pli da memfido. Kiam fido pri ilia kapablo lerni estas frue plantita en ili, ili emas fariĝi pli bonaj lernantoj pli poste. Multaj larĝskalaj studoj en pluraj landoj jam montris, ke se indiĝenaj kaj monoritataj infanoj ricevas sian edukadon precipe uzante siajn proprajn lingvojn, ilia ĝenerala lerneja sukceso estas pli bona kaj ili lernas la dominan lingvon pli bone ol se ilia instruiĝo okazas per la medio de la domina lingvo. Pli bonaj lernantoj fariĝas produktivaj civitanoj. Do, edukado per denaska lingvo estas grava elemento en sukcesa eduksistemo.

Nia asocio kontraŭas ĉiujn formojn de maljusta diskriminacio surbaze de lingvo, kaj pledas por uzado de neŭtrala, senpartia internacia lingvo por tutmonda komunikado. Ni celas lingvan unuecon en diverseco.

Okaze de la ĉi-jara Internacia Tago de la Indiĝenaj Popoloj de la Mondo, dediĉita ĉi-foje al edukado, kaj en solidaro kun indiĝenaj popoloj en ĉiuj landoj kaj regionoj, ni salutas la laboron de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko subten al indiĝenaj popoloj tra la tuta mondo.

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041